



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Denove havebla:

"El la vivo de netaŝgulo"

(Aus dem Leben
eines Taugenichts)"
Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 34/1975 20 sep 1975
Aperas ĉiusemajne

46-a Itala Esperanto-Kongreso

Triesto (Radio Roma/pp) Inter la 13-a kaj 19-a de septembro 1975 okazis en Triesto, en nord-orienta Italujo apud la landlimo la 46-a Itala Esperanto-Kongreso.

Temo de la kongreso estis "Plureco de kulturoj kaj internacia lingvo", tre taŭga ankaŭ pro la aparta situacio de Triesto, kiu de ĉiam estas engaĝita kunfandi tri diversajn kulturojn, la italan, slavan kaj la germanan. La inaŝgura parolado, pri ĉi tiu temo, estis farita, antaŭ pli ol 350 kongresanoj kaj en ĉeesto de pluraj eminentuloj (inter kiuj la prezidanto de la Regiono Friulo Venetio kaj la jugoslava konsulo en Triesto) de profesoro Fabrizio Pennacchietti, kiu instruas semidajn lingvojn en la Torina Universitato. Lia referaĵo substrekis la valoron de la internacia lingvo por venki la barojn inter diversaj lingvoj kaj kulturoj, pere de neŭtrala rimedo. La temo estas tre aktuala, ankaŭ pro la pliintensiĝantaj demarŝoj por konstrui plurnaciajn unuigojn, ekzemple la Eŭropan Ekonomian Komunacion, kaj pro la remalkovro, interne de la unuopaj ŝtatoj, de la ekzisto de minoritataj lingvoj kaj kulturoj, kiuj asertas, kelkfoje eĉ perforte kiel en Korsiko, sian ekziston kaj sian volon evolui.

La asembleo de la Itala Esperanto-Federacio debatis la 14-an kaj la 15-an, ne nur organizaajn problemojn, sed ankaŭ principajn demandojn, kiel la esencon de esperantismo. En vigla sed korekta atmosfero, plura partoprenintoj prezentis sian opinion pri la celoj kaj metodoj de la Esperantomovado; iuj substrekis la "internan ideon" kaj la principojn de interkompreniĝo lingva kaj kora, aliaj pledis por subteno de nova linio, kiu postulas lukton kontraŭ "lingva diskriminacio". Pri la temo ankaŭ prelegis profesoro Peter Glova Foster de la brita Universitato de Hull, konata sociologo kaj spertulo pri la sociologiaj fenomenoj interne de la Esperantomovado. Li pritraktis la ŝanĝiĝojn, kiuj okazis en la interpretado de la Esperantista ideologio en la daŭro de ĉi tiu jarcento. Estas konate, ke unu el la ĉefaj komponentoj de la oficiala ideologio de la Esperantomovado estas neŭtraleco fronte al la politikaj tendencoj, kiuj aperas en la diversaj landoj kaj epokoj, Efektive estus malfacile, en la mala kazo, kunteni movadon, kies membroj vivas en pli ol 80 landoj, kun plej diversaj politikaj kaj sociaj sistemoj. Tiu ĉi neŭtraleco, tamen, laŭ la plej ĵusaj interpretoj, haltas tie, kie komenciĝas perforto al la homaj rajtoj en la lingva kaj kultura kampo. Ĉar lingvaj kaj kulturaj fenomenoj estas, tre ofte, ligitaj kun tiuj politikaj, stariĝis la demando pri la limoj inter lingvo kaj politiko.

En alia prelego, prof. Foster pritraktis la sociologian konsiston de la Esperantomovado. La esperantistoj - li diris - dissemataj tra la tuta mondo, jam nun konsistigas mikrokosmon, kiu havas oftajn interŝanĝojn kaj renkontiĝojn. Por la esperantistoj, Esperanto estas realo jam funkcianta, kiun ĉiu utiligas por plivastigi siajn horizontojn, kaj memkompreneble temas pri socio profunde "plureca", pro la diverseco de nacio, de socia deveno, de kultura nivelo.

GEA al la landaj asocioj en Okcidenta Eŭropo

Hamburgo (pp) Nome de Germana Esperanto-Asocio s-ino Elsbeth Bormann, estraranino de GEA, turnis sin en letero al la landaj asocioj de UEA en okcidenta Eŭropo rilate al la planita konferenco de socialdemokrataj esperantistoj en Romo, 1976. La letero tekstas:

"Certe vi memoras, ke en la pasinta jaro s-ro d-ro Menabene alskribis multajn aktivulojn, lanĉante la ideon, ke la socialdemokratoj alprenu por sia internacia laboro la Internacian Lingvon. La itala socialdemokrata partio (PSDI) eldonis tre bonan varbbruŝuron, kiu nun ankaŭ estas je dispono en la germana (kaj en la sveda) lingvo.

Ni en la estraro de Germana Esperanto-Asocio pridiskutis eblan kunagadon kaj decidis favori la iniciaton, kvankam ĝi estas partipolitika. Sed ni ankaŭ jam kelkfoje havis rilatojn en liberaldemokrataj rondoj, do ni trovis taŭge, ke ni ankaŭ kunagu en tiu afero. Al tio ni konvinkigis despli ĉar nia nuna registaro en Bonn estas ĉefe el socialdemokratoj kaj 45 % de niaj parlamentanoj apartenas al tiu partio. Ni tradukis la italan bruŝuron kaj forsendis ĝin al socialdemokrataj instancoj en Germanio, kio vekis ioman intereson.

Preskaŭ 2-jara laboro ĉe la gvidaj instancoj de la socialdemokrata partio en Bonn nun finfine donis rezulton, nome: la afergvidanto, s-ro Holger Börner, konsentis, ke SPD ĉeestu dum la planita konferenco en Romo. SPD skribis la 22-an de aŭgusto 1975 al PSDI - cetere en la franca lingvo -, ke ĝi sendos unu oficialan observanton en delegacio kunmetenda de Germana Esperanto-Asocio.

La ideo de tiu konferenco nun estas ankaŭ nia afero. GEA estas forte interesita, ke ĝi ne nur restas ideo. Ni pere de tiu letero petas ĉiujn estrarojn de Landaj Asocioj, ke ili en sia plej venonta estrarkunsido pridiskutu la eblan kunagadon. Ili bonvolu kontakti la instancojn de siaj socialdemokrataj partioj kaj alstrebu, ke ankaŭ ili estu konvinkitaj pri tiu konferenco en Romo. Ĉar la socialdemokrataj partioj ja ĉie en la mondo estas por ŝancegaleco ankaŭ la uzo de Esperanto inter la partioj devus esti por ili akceptebla.

Ni ankaŭ utiligu miajn gazetojn esperantistajn kaj niajn radiostaciojn por plej vaste informi pri tiu planita konferenco. Ni helpu per ĉiuj rimedoj, ke tiu konferenco en Romo povu okazi kaj ĝi fariĝu bonega manifestacio por Esperanto pro la ĉeesto de plejble multaj socialdemokrataj instancoj.

Mi esperas, ke mi ne vane alskribis vin, kaj ke vi tiun leteron prenas kiel komencon de via laboro en tiu kampo, por ke Esperanto havu plian paŝon antaŭen.

Sincere salutas Elsbeth Bormann

Norda Prismo nun en la sudo

Milano (pp) Laŭ informo de Radio Roma la itala revuo "Literatura Foiro" heredas la literaturan revuon "Norda Prismo". La novaj eldonantoj volas daŭrigi la "nordan tradicion": "Ni volas esti poresperanta revuo: ni parolos pri kulturo, socio, literaturo esperantlingve. Ni volas pruvi, ke estas multe da latentaj trezoroj en la kultura mondo."

GEFA-jarkunveno en Treuchtlingen

Kiel ni jam informis de la 10 - 12 oktobro 1975 okazos la jarkunveno de la germanaj fervojistoj-esperantistoj. La programo estas alloga ankaŭ por ne-fervojistoj. Venu al Treuchtlingen! Informojn donas: Josef Weidacher, 8 München 82, Schneefinkenweg 11 aŭ GEFA, 6 Frankfurt/M Karlstr. 4-6.

Dum la kunveno estos Esperanto-ekspozicio kaj Esperanto-Librostando!

Kolokvio pri lingva problemo en Eŭropo

Saarbrücken (pp/gb) La Kolokvio pri la lingva problemo en Eŭropo okazinta de la 20-a ĝis la 21-a de septembro 1975 en la Eŭropa Akademio Otzenhausen kaj organizita de Eŭropa Unio Germanio kunlabore kun Sarlanda Esperanto-Ligo en kunagado kun prof. d-ro Helmar Frank, Universitato Paderborn, prof. d-ro Ivo Lapenna, Universitato Londono, kaj prof. d-ro Max Mangold, Universitato de Sarlando, venis unuanime kun 3 sindetenoj al sekva rezulto:

Esenca malfacilaĵo en la interkomprenado de la popoloj de Eŭropo rezultas el la multlingveco de tiuj popoloj, same rilate la politikistojn, la administraciojn kaj la oficistojn en la Eŭropa Komunuaĵo.

Tiun malfacilaĵon oni ne plu povas venki per la ĝisnunaj rimedoj (financa problemo laŭ prof. d-ro Lapenna).

Kiel solvoj prezentiĝas:

- En ĉiuj landoj de la Komunuaĵo oni enkonduku jam en la baza lernejo duan lingvon aldone al la gepatra lingvo kiel devigan lingvon.
- En la Komunuaĵo oni oficialigu Esperanton aldone kaj laŭgrade. La elekto de unu nacia lingvo kiel oficiala lingvo ne estas ebla sen preferi unu nacion kaj diskriminacii ĉiajn aliajn.
Pro kaŭzoj de ŝancegaleco (prof. d-ro Frank) estu elektita neŭtrala lingvo. Por tio prezentiĝas laŭ prof. d-ro Mangold rekte Esperanto, kies avantaĝoj estas: facila lernebleco, monda disvastiĝo, vivanta esprimkapablo, klara formulado kaj bona komprenebleco.
- Oni konsciigu la vastan publikon per ĉiuj amaskomunikiloj pri la lingva problemo kaj oni reliefigu Esperanton kiel alternativon. La politikistoj transprenu la taskon popularigi tiun problemon en la instrusistemoj. Esperanto devas trovi eniron en la lerneĵajn instruplanojn.

La rapida unuiĝo de Eŭropo estas necesa kaj nur atingebla per la rekta elekto de la Eŭropa Parlamento en 1978 kaj la realigo de la politika unio ĝis 1980.

La apliko de Esperanto kiel oficiala lingvo povas helpi por efike solvi la lingvan problemon.

Esperanto-Semajnfino en Londono

Londono (ps-bea/pp) De la 12-a - 14-a de decembro 1975 okazos en Londono Esperanta Semajnfino.

El la provizora programo:

Vendrede 20.00 - 24.00 horo INTERKONA VESPERO

Sabate Antaŭ- kaj posttagmeze: libertempo por butikumi (la butikoj en Oxford Street restas malfermitaj dum la tuta tago)

Samtempe: diversaj seminarioj por viroj, aktivul(in)oj, kaj malbutikumuloj.

Vespere: 19,30 - 24,00 horo Zamenhofa Bankedo kaj Balo

Dimanĉe 11,00 horo 'Esperanto ĉe la oratora angulo en Hyde Park'
13,00 horo Komuna Lunĉo
15,00 horo Diservo en la Franca Protestanta Preĝejo
Soho Square
16,00 horo Adiaŭoj

Krome estas ebleco la librovendejon ĉe BEA kaj partopreni la Zamenhof-Vesperon de la Londona Klubo je la 18,30 horo
Aliĝkotiĝo 5,50 anglajn funtojn! Petu aliĝilojn de Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, Britujo.

Usonaj esperantistoj en Ĉinio

EPC-raporto

Pekino (opĉ/pp) Kiel membroj de la Usona Delegacio "Amikoj de Ĉinio", du usonaj esperantistoj, s-ino Mineava Rees kaj s-ro Paul Stein, vizitis Ĉinion en septembro kaj havis amikan renkontiĝon kun esperantistoj de la redakcio de El Popola Ĉinio.

S-ino Rees estas fervora membro de Esperanta Ligo por Norda Ameriko, kiu kunportis al Ĉina Esperanto-Ligo tri leterojn respektive de s-ro W. R. Harmon, prezidanto de EEMA, s-ro G. Rodenborn, prezidanto de San-Franciska Resperanto Regiona Organizaĵo, kaj s-ro W.H. Schulze, direktoro de Esperanta Informa Centro kaj usona peranto por la revuo El Popola Ĉinio.

Ili estas unuaj usonaj esperantistoj, kiuj vizitis Ĉinion kaj renkontiĝis kun ĉinaj esperantistoj. Ilia vizito plifortigis la amikecon kaj interkompreniĝon inter la popoloj kaj esperantistoj de Ĉinio kaj Usono.

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (I.E.K.A.)

Raporto pri la jarkunveno

Kopenhago (pp) Kadre de la 60-a Universala Kongreso de Esperanto okazis la 29-an de julio la jarkunveno de I.E.K.A., kiun ĉeestis ĉ. 55 personoj.

El la kunvena protokolo ni citas:

Raportoj estas ricevitaj de agado en 28 landoj, inkluzive de persona raporto de s-ro Grattapaglia pri Brazilo kie li intencas agi por I.E.K.A. baldaŭ. En Jugoslavio oni intencas organizi aŭtan karavanan al Ateno 1976. En Nederlando oni ne sukcesis aperigi artikolon pri I.E.K.A. en la Komuna Esperanto-Revuo. En Norvegujo s-ro Step-Bowitz estas provizora peranto kaj la Norvega Revuo intencas aperigi fakan artikolon pri I.E.K.A.

La membro-listo kreskis de 799 ĝis 921 (el 29 landoj) en la jaro 1974/75. D-ro Bormann diris, ke necesas varbi! Pro unufoja kotizo, ni estas vivkapablaj nur se konstante venadas aliĝkotizoj.

D-ro Bormann apelaciis al la anoj peti la Esperanto-lingvajn propektojn de FIAT. S-ro Grattapaglia diris, ke FIAT pretas pagi la dogankostojn, se oni sendos al Torino la fakturojn.

La iama sidejo en Torino ne plu validas! Oni traktu rekte kun s-ro J. Guillaume, sekretario de I.E.K.A., 66 de Grasse Village, F-78 810 Feucherolles, Francio.

Longa diskuto okazis pri la ses-lingva fakterminaro, kiun komencis siatempe s-ro Jaumotte.

Fine s-ro Guillaume faris mallongigitan prelegon pri la estonta aŭtomobilo, kiun s-ro Grattapaglia kompletigis.

La membraro de I.E.K.A. 1975

Argentino	36	Francio	171	Madagaskaro	11
Aŭstralio	5	Germanujo	94	Monako	1
Aŭstrio	4	Hispanio	35	Nederlando	92
Belgujo	45	Hungario	1	Norvegujo	11
Brazilo	1	Israelo	1	Pollando	5
Britujo	100	Italujo	92	Rumanio	2
Bulgarujo	12	Japanujo	2	Svedujo	41
Ĉeĥoslovakio	21	Jugoslavio	23	Svisujo	4
Danujo	20	Kanado	50	Usono	34
Finnlando	8	Luksemburgo	5		